

Massimo Introvigne Komentarioj „EKLEZIO kaj MONDO“

Eksparoĥestro Pascal Vésin komencis dimanĉe la 14-an de julio 2013 Marŝon sur Romon, kiel li mem tion nomis (Marche sur Rome). Li eliris kun areto da samcelanoj je la 8-a horo matene el Mègeve en Supra Savojo en Francio. Li planas perpiede alveni Romon post kvardek tagoj, volante postuli aŭdiencon de la papo Francisko kaj ĉiukaze li kalkulas kun tio, ke pri li atentos ĵurnalistoj.

Kiu estas tiu pastro? Kial li estis senigita el paroĥestra ofico kaj kontraŭ kio li volas protesti? La historieto estas simpla. En la jaro 2001 tiu ĉi katolika pastro el diocezo Annecy, ordinita en la jaro 1996, membriĝis al framasona loĝio de franca Granda Oriento. Tiu ĉi framasona obedienco kun plej multnombra membraro estas en Francio plej malfermite kontraŭkatolika. La pastro Vésin siajn simpatiojn al framasonismo plurfoje esprimis kaj tiel estis lia aparteno al tiu ĉi societo publika sekreto. Nur en la jaro 2010 lin alvokis lia episkopo, Mons. Yves Bouvineau, kiu estis informita per anonima letero. „Mi ne estas framasono, tio estas kalumnioj“, respondis li unue al la demando de sia episkopo. Sed unu jaron pli poste lia loĝio eldonis flugfolion propagandan konferencon, kadre de ĝi – kiel tie tekstis – publike parolos pastro Vésin „kiel framasono“. Denove li estis demandita flanke de sia episkopo kaj ĉifoje li konfesis veron. Estis donita al li tempo por pripenso kaj decidiĝo, ĉu li volas resti en loĝio aŭ en eklezio, kaj la episkopo ĉion anoncis en Romo al Kongregacio de Kredinstruo. Nunjare marte, post kiam pastro Vésin rifuzis elaniĝi el framasona loĝio, la Kongregacio ononcis lian suspendon.

Eble tro malmulte kaj tro malfrue – la episkopo povis interveni pli frue kaj pli emfaze – sed nuntempe eĉ tio estas io. Des pli, ke la episkopo mem ĉion eksplikis al kredantoj, kiuj ne volis rezigni pri sia popu-

lara paroĥestro, kaj li publikigis noton nomitan „Kristano kaj framasono: argumentoj de neakordigeblo“. Temas pri elstara dokumento, kiu montras, ke sinteno de la eklezio rilate al framasonistaj loĝioj konstante direktiĝas per „Proklamo pri framasonismo“ eldonita la 26-an de novemro 1983 de Kongregacio de Kredinstruo. Tiam ĝin subskribis tiama kardinalo Ratzinger kaj eksplicite ĝin subskribis papo Johano Paŭlo la Dua. Temas do pri papa magisterio. Tiu ĉi tridek jarojn ekzistanta proklamo asertas, ke „negativa juĝo de la eklezio pri framasonistaj asocioj restas neŝanĝita, ĉar iliaj principoj estis ĉiam rigardataj kiel neakordigeblaj kun la eklezia instruo, kaj tial aniĝo al ili estas malpermesita. Kredantoj, apartenataj al framasonaj asocioj, estas en stato de grava peko kaj ne povas akcepti la sanktan komunio“.

La dokumento de la franca episkopo el Annecy eksplikas, ke malpermeso de aneco al framasona loĝio de kiu ajn obedienco por katolikoj kaj des pli por sacerdotoj rezultas el fakto, ke „mem bazo de la framasonismo estas relativismo. Ĝi estas kerno de neakordigeblo konsidere al konsekvencoj, kiujn ĝi havas rilate al kredenhavo eĉ al kredago mem, al moralo de agado kaj al aparteneco al eklezio, Korpo de Kristo. Framasonoj negas objektivan ekkonon de la vero. De framasono estas postulite, ke li estu libera homo, kiu agnoskas neniun submetiĝon al dogmo, kio en si inkluzivas principan rifuzon de ĉiu kredenhava sinteno de la eklezio, kiu »staras sur dogma fundamento«.

Ne surprizas, ke franca Granda Oriento reagis je sinteno de la eklezio per eldiri pri „reveno de inkvizicio“. Sed pli surprizas solidareco, kiun eĉ iuj katolikaj gazetoj



esprimis al pastro Vésen, kiu laŭdire nur defendas liberecon de pensado. Sed kiel eksplikas papo Francisko en encikliko Lumen fidei, la eklezio ne estas loko, kie ĉiu decidas propravole. La Sinjoro al ĝi konfidis, ke ĝi anoncu veron. La kredo ne estas malklara sento, sed ĝi havas precizan enhavon esprimitan ĝuste per dogmoj, kiujn framasonismo volus emeritigi. La tuta evento montras al sufiĉe grava haoso reganta inter multaj katolikoj, se temas pri karaktero de la framasonismo.

Patro Vésin do ekiras festi Francan revolucion per marŝo sur Romon kaj li allogas ankaŭ pluajn per tio, ke li sin proklamas kiel subtenanto de samsekseca geedzeco. Ŝajnas, ke tio kune ne koheras, sed eble koheras, ĉar, se oni akceptas framasonan relativismon, ekzistas malfermita vojo al pritraktado de ĉiuj principoj eĉ al akcepto de ĉiuj modernaj „rajtoj“.

El interreta taggazeto La nuova bussola quotidiana el la 14-a de julio 2013 tradukis ĉeĥlingven Milan Glaser ■